




# Boletín

Nº 428 Oktobro - Decembro 2019



*Asociación de utilidad pública*

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
aperanta de 1949  
Numero 428

Redakto-skipto  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
respektivaj aŭtoroj

\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

\*Republikado de enhavo nur permesita kun per-  
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: [financoj@esperanto.es](mailto:financoj@esperanto.es)

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

[admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es)

## Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

[admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es)

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926  
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo)

### Estraro

**Prezidanto:** José Antonio del Barrio

**Vicprezidanto:** Ángel Arquillos López

**Sekretario:** Águeda Biurrún

**Kasisto.** Jesús M. García Iturrioz

**Voĉdonantoj:** Eduardo Berdor  
“ Alberto Granados

**Prezidanto HEJS:** William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

# SALUTVORTOJ

Karaj kunasocioj kaj amikoj,

Tiu ĉi estas la lasta numero de la jaro 2019, kaj mi profitas la okazon deziri al ĉiuj belan novan jaron 2020, kun multe da ĝojo kaj ankaŭ da aktivado.

En tiu ĉi venonta jaro, konkrete komence de majo, ni havos la okazon renkontiĝi en tre bela urbo, Comillas, apud la maro kaj la montaro, kun bela arkitekturo kaj historia universitata etoso. La kantabraj samideanoj pretigas altiran programon, kiu espereble egalos kaj eĉ superos la jam altan nivelon kiun niaj renkontiĝoj atingis en la lastaj jaroj. La ritmo de aliĝado estas sufiĉe kontentiga, kun cento da enskribiĝintoj jam en la momento redakti tiun ĉi bultenon. Ni atendas vin ĉiujn tie.

En tiu ĉi renkonto finiĝos la deĵorperiodo de la estraro, kaj venos la vico elekti novajn gvidantojn de nia asocio. Kiel vi legos en aparta alvoko, ni deziras iom plani, se eble, la transiron al la nova estraro. Bonvolu pripensi kiel vi mem povas kontribui al la vivanteco kaj pluagado de la asocio, kaj kontaktu la kreitan elektan komisionon por proponi viajn ideojn, kaj kontribuu surloke dum la kongreso al la renovigo de la estraro.

Por mi persone finiĝos naŭjara periodo, en kiu mi rolis kiel prezidanto. Mi planas fari bilancon dum la kongreso, interŝanĝante miajn spertojn kun la ĉeestantoj, eble eltirante lecionojn por venontaj gvidantoj. Sed mi jam povas diri al vi ke mia sento estas tute pozitiva el persona vidpunkto. Mi ĝojis – ankorau ĝojas– la atingojn kiujn ni sukcesis akiri, sed ankaŭ la varmon kiun mi sentis el vi ĉiuj. Mi tute rekomendas la sperton, kaj esperas ke la nova prezidanto, kaj la tuta nova skipo, povos ĝui saman konfidon kaj bonkorecon.

Venu al Comillas. Ni havas multon por preparoli!

*José Antonio del Barrio*  
*Prezidanto de HEF*

# ENHAVO

1. Salutvortoj.
2. Noto pri donaco / Noto pri nepagintoj kaj aliĝado
3. Fundación Esperanto, 50-jara
4. Informado pri 2019/Projekto 2020
5. Alvoko por kandidatoj por nova estraro
6. Mia sperto en IJK 2019
8. Kotizoj por UEA
9. Pri grupoj kaj Asocioj
17. Espernto Ateliero pri Manga kaj Esperanto Agado
19. Sukceso de la 2a festivalo de lingvoj de la mondo
20. Invito al Comillas
21. Promenado laŭ la Jakoba Vojo (postkongresa ekskurso)
24. Rompu! Rompu! Teatraĵo en Esperanto
25. Belartaj konkursoj/Poesia Angulo
26. Liberecana Ateneo de Gràcia
23. La Andaluzia Rokmuziko (dua kaj fina parto)
30. Klimatsanĝo, alispeca pluvo

---

## NOTO PRI DONACO

Kune kun tiu ĉi bulteno vi ricevas jarkomencan donacon de HEF: algluaĵon pri Esperanto, kiun vi povas alglui ekz. Sur la vitro de via aŭto (bv atenti la internon de via koverto!). La grupoj apartenantaj al HEF ricevos aparte ioman kvanton da ili. Homoj kiuj ricevas la bultenon nur rete, povas ricevi la algluaĵon skribante al la adreso [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es), kun via poŝta adreso. Aldonajn algluaĵojn oni povas ricevi kontraŭ tre modesta prezo, bv kontakti la saman adreson por tio. Feliĉan jaron al ĉiuj!

## NOTO PRI NEPAGINTOJ KAJ PRI ALIĜADO

Se la etikedo en la koverto de tiu ĉi sendo havas ruĝan asteriskon, tio signifas ke HEF ne ricevis la kotizpagon dum la lasta(j) jaro(j) kaj ni ankaŭ ne ricevis respondon al la mesaĝo sendita de la Federacio. Sekve tiu ĉi estas la lasta Bulteno kiun vi ricevos. Bv skribi al la sidejo de la Federacio aŭ kontakti kun la adreso [financoj@esperanto.es](mailto:financoj@esperanto.es), kaze ke okazis problemoj kaj vi plu deziras esti membro de la asocio.

Vi ankaŭ povas aktualigi viajn datumojn en la reto, en la adreso [www.esperanto.es/inscripcion](http://www.esperanto.es/inscripcion), aŭ sendante la aliĝilon kiu troviĝas en la dorso de tiu ĉi numero.

# “FUNDACIÓN ESPERANTO” 50-jara



“Fundación Esperanto” [hispanlingva oficiala esprimo] estas fondaĵo formale establita en 1969 de HEF sub la tiama prezidanteco de S-ro Miguel Sancho Izquierdo.

Eble, konvenas atenti iomete pri teoriaj, praktikaj kaj historiaj flankoj.

Fondaĵo estas “estabelejo kreita por speciala, ordinare socia, celo, kaj provizita per sufiĉa kapitalo aŭ rento por povi daŭre funkcii” (difino en PIV, 2002). Foje, aperas por tiu koncepto alia vorto, nome, “fondumo” (kiu ne aperas en PIV). Ne konfuzu kun “fonduso”, kiu estas la kapitalo destinata por aparta, difinita

celo.

En jura teorio, inter institucioj aŭ organizoj oni distingas pri kerna elemento:

- Asocio: personoj kunigitaj por celo. “Universitas personarum”.
- Fondaĵo: kapitalo organizata por celo socivalora. “Universitas bonorum”.

Do, fondaĵo estas institucio kun jura personeco starigita per havaĵo destinata kun daŭra karaktero al realigo de celo kun ĝenerala intereso (sen profitcelo). En HEF-Bulteno n-ro 340 (marto-aprilo 1999), aperas interesa informo pri ĉi tiu temo. Oni povas indiki la tri bazajn elementojn de ĉiu fondaĵo:

- La celo: identigilo, ekzisto-kialo, direktilo de la agado plenumenda.
- La havaĵo: kapitalo (fonduso de la fondaĵo) kiu devenas al tri fontoj: mondonaca doto, monkontribuoj kaj interezoj, rentoj aŭ profitoj.
- Organizado: grupo de personoj en ia strukturo. Ekzistas: prezidanto, sekretario kaj patronoj. Ili regas, reprezentas la institucion kaj zorgas kaj respondecas pri la agado. Povas esti direktoro, volontuloj, laboristoj... depende de la ebloj.

En Hispanio, aktuale, oni devas atenti al la leĝo 50/2002 pri fondaĵoj (BOE 27.dec.2002), kiu reguligas la kreon kaj funkciadon de fondaĵoj.

Oni devas krome memoriĝi, ke pri donacoj al tiaj institucioj, oni rajtas dekalkuli ioman procentaĵon el la impostita kalkulo okaze de la ĉiujara Deklaro de la Imposto pri la Rentoj.

Pri nia fondaĵo, la aktuala Statuto estis aprobita la 1an de decembro de 2004. La celo estas stimuli la instruadon kaj disvastigon de la internacia idioma Esperanto (art. 6). Aktuale, la fizika sidejo troviĝas en Zaragozo. La Protektorato (organo de kontrolo) estas la Registaro de la Aŭtonoma Komunumo de Aragono. Kiam ĝi estis kreita, la prezidanto de la fondaĵo devis esti tiu de HEF. Nuntempe, ne. La fondaĵo naskiĝis danke al komenca dono de 50.000 pesetoj. Poste, elstaras la kontribuo de heredaĵo de la geedzoj Pedro Casanoves kaj Elisa Ferrándiz.

Estas komplike menciit kelkajn nomojn ĉar oni ne povas menciit ĉiujn. Sed mi ne volas malprofiti la okazon memori kelkajn: ekde la aktuala prezidanto (Antonio Marco Botella) ĝis aliaj kunlaborantoj kiel Víctor Ortiz Gratal, Miguel Gutiérrez Adúriz, José María Rodríguez Hernández, José Antonio del Barrio Unquera...

Dum la 50 jaroj da ekzistado, "Fundación Esperanto" helpis ene de ties limigitaj kapabloj diversaj projektoj, organizoj kaj agadoj. Elstaras la eldono de la traduko al Esperanto de Kihoto en 1977 (menciindas la monhelpo-anticipo de Víctor Ortiz kaj donaco de geedzoj Manteca-Cano por la pago de la traduko). Oni pagis por tradukoj (foje en formo de premioj), por organizado de kursoj, eldono de libroj, ktp. Lastatempe, oni emis helpi prefere al grupoj kaj por aktivaĵoj jam faritaj.

Lorenzo Noguero

Sekretario de "Fundación Esperanto"

---

## **FUNDACIÓN ESPERANTO:**

### **INFORMADO PRI 2019**

La helpoj programitaj por 2019 estis anoncataj kaj publikigataj en n-ro 424 de "Boletín" (okt-dec.2018) de HEF.

Kiel oni scias, ni disponas je modesta kvanto por helpoj (kvankam, en 2019 pli alta ol kutime). Sekve, ni decidis destini helpojn al nur du grupoj:

- Pago de aŭtor-rajtoj por traduko de romano de M. Delibes. La traduko estas farata senpage de A. Valén: 500 €.

- E-Grupo de Bilbao: 200 €. Pro organizado de E-kursoj.

Krome, kiel kutime, en nia sidejo en Zaragozo estis organizitaj E-kursoj.

### **PROJEKTOJ POR 2020**

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2020.

Principe, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 400 €.

Lorenzo Noguero

(Sekretario de "Fundación Esperanto")

---

---

# ALVOKO POR KANDIDATOJ POR NOVA ESTRARO

En 2020 finiĝas la deĵorperiodo de la nuna estraro de Hispana Esperanto-Federacio, kaj oni planas kunvoki la elektojn de la nova ĉe la Ĝenerala Kunveno de la asocio, kiu okazos la 3an de majo dum la 79a hispana kongreso, en Comillas.

Ni deziras fari malferman alvokon al la membroj de la asocio, por ke ĉiu pripensu sian eblan kandidatiĝon al la estraro. Kelkaj el la estraranoj pretas daŭrigi, por faciligi la kontinuecon, sed oni certe devos renovigi almenaŭ la postenojn de prezidanto kaj sekretario. Ĉiukaze, ĉiuj postenoj estas malfermaj al la renovigo, ĉar kompreneble la anoj estos la decidantoj.

La estraro aprobis krei elektan komisionon, kies celo estas kontakti eblajn kandidatojn, enketi ĉe eblaj interesitoj, ricevi proponojn de homoj pretaj kunlabori. Tial, oni povas pensi pri kreado de skipo, kiu povos prezenti sian kandidatiĝon, samtempe zorgante, se eble, pri varieco laŭ geografia deveno, sekso aĝo kaj sperto. La tasko de la komisiono certe NE estas elekti la estraron, sed nur faciligi la transiron kaj, se eble, ne lasi ĉion por la lasta momento.

Ĝi konsistas el José María Salguero (Kani <saliko69@hotmail.com>), Miguel Gutiérrez Adúriz (<sferoj@gmail.com>) kaj Rosa López (<rosadelibertad@gmail.com>). Vi povas kontakti ĉiun el ili se vi havas proponon. Sciu ankaŭ ke se iu el ili kontaktas vin, tion ili faras ne kaprice, sed pro tiu tasko komisiita de la estraro. Ĉiukaze, ni insistas, ĉiu rajtas prezenti sian kandidatiĝon ĝis la lasta momento en la Kunveno, kaj certe la ĝenerala Kunveno decidos pri nomoj kaj postenoj.

Vi povas legi la postenojn kaj ties taskojn en la Statuto de la asocio, kiun vi povas trovi en la interna spaco de la retejo kaj ankaŭ en la adreso: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/la-asociacion/estatutos>.

Helpu la asocion kaj kandidatiĝu!

*La estraro de Hispana Esperanto-Federacio*

## MIA SPERTO EN IJK 2019

-Mia sperto en IJK 2019 estis agrabla kaj interesa. En tiu ĉi raporto, mi skribos pri la programeroj je kiuj mi partoprenis, sed ni ankaŭ ne devas forgesi la komunan etoson.

Unue, IJK 2019 staris en Liptovský Hrádok, malgranda vilaĝo en Slovakio. Ni loĝis en du loĝejoj, kaj ni havis permeson uzi ankaŭ la kulturdomon de la vilaĝo. Apud la programeroj, ni havis la opcion iri ekskursi pli malpli ĉiutage, kaj multaj el ni iris manĝi kune, fojfoje ekster la manĝejo. Ankaŭ estas menciinda, ke la ĉeftemo estis “Kontraŭ antaŭjuĝoj”, kaj multaj programeroj temis pri tio (ekzemple, “Esperantistoj kontraŭ antaŭjuĝoj”, aŭ “Antaŭjuĝoj pri nuklea energio”.

Nun mi parolos pri mia persona sperto:

Dimanĉo 28-a

Ĝi estis kvieta tago. Precipe ĉar la ankoraŭ partoprenantoj devis alveni al la urbo, aŭ eĉ al la lando. Mi alvenis dum tiu mateno, kaj tiu tago estis tre agrabla, ne nur ĉar oni renkontas geamikojn, sed ĉar oni povas antaŭpretiĝi por la eventoj de la venontaj tagoj.

Lundo 29-a

La lundo okazis la solena malfermo de la kongreso en la kultura domo. Mi ĉeestis la komitatkunsidon de TEJO ĉar mi devis partopreni anstataŭ HEJS-a kunulo, kiu ne povis veni al Slovakio. Vespere, oni povis ĉeesti la Nacian Vesperon, ankaŭ en la kulturdomo. Tie, oni povis spekti regionaj dancoj, ktp. Malĝoje, mi ne kapablis ĉeesti ĉar mi estis ankoraŭ tro laca pro la vojaĝo.

Mardo 30-a

Tiam mi partoprenis en la programeroj “Antaŭjuĝoj en la GLAT-a komunumo”, kaj iomete en la kurso de la hungara, sed mi ne povis ĉeesti la kurson de la slovak lingvo. Tiu tago estis tre amuziga, ĉar ni ĉiuj veturis al proksima vilaĝo (Liptovský Mikulaš) por partopreni en la kulturlingva festivalo. Tie, la partoprenantoj ne nur kunportis manĝaĵojn el ĉie en la mondo, sed ankaŭ estis aliaj tabloj, kiel “biciklista manĝaĵoj”, aŭ eĉ “vegana tablo”. Poste, ni spektis du koncertoj, de Barbora Hazuchová, kaj de Jonny M. Nokte, ni prenis buson al Liptovský Hrádok denove.

Merkredo 31-a

Matene, kelkaj personoj ĝojis la aligatorejon, je kiu oni povis paroli multege da lingvojn. La ununuraj reguloj estas ke esperanto kaj denaska lingvo ne estis permesitaj; sed ni eĉ povis koni homojn kiu parolis la latinan, la tajan, ktp. Je tiu tago, mi atentis ekskurson: mi promenis al proksima kastelo, kaj tie ni plantis arbon por memori la kongreson. Mi ankaŭ atentis la prelegon pri “Ĉuvaŝa lingvo kaj regiono”, kiu estas turkida lingvo en Rusio. La preleganto eĉ invitis nin vivi tri monatojn en la regiono kaj labori kun li en lia lingva akademio.

Ni ankaŭ atentis la koncerton de Tim Gallego en la loka kultura domo. Nokte, en mia loĝejo, oni preparis konkurson pri diveni la lingvoj de kelkaj kantoj, sed tio ne aperis en la programo, do mi alvenis malfrue.

### Ĵaŭdo 1-a

Tiu tago estis rezervita por la KER ekzamenoj kaj ekskursoj. Mi agis kiel en la unua tago: mi restis kaj parolis kun la homoj kiuj ĉeestis en la kongresejo. Vespere, ni reiris al la parko kie ni plantis la arbon, tiufoje por spekti la koncerton de Noa kaj Martí, ĉiuj sidigis sur herbo. Ni povis manĝi fruktojn kun aŭ sen alkoholaĵoj.

### Vendredo 2-a

Tiu tago estis plena je mallongaj programeroj: mi iris al “Inspirigaj rakontoj”. Homoj parolis pri vivaj spertoj, kiujn ili antaŭpreparis aŭ ne. Dum tiu tago mi ĝojis la Kvizon de Antonia, konkurso pri ĝenerala kulturo. Mi ankaŭ iris al la dua aligatorejo, kaj spektis la du vesperajn koncertojn: la koncerto de Kimo kaj Garo, kaj ankaŭ la koncerton de Adéla Kvitová. En tiu lasta koncerto, ili havis problemon kun la laŭtiloj kaj neblis fini, do ni simple parolis kune iomete. Stranga, sed ne malagrable.

### Sabato 3-a

Tiu tago mi partoprenis en la programero pri Filozofio kaj Teorio de Feliĉo, kiun mi persone ne ŝatis. Poste ni komentis ke la preleganto multe parolis pri sia vivo, sed malmulte pri feliĉo. Mi ankaŭ spektis la prelegon “Antaŭjuĝoj pri nuklea energio”, kiu estis tre malrapida, sed ĝi plaĉis al mi ĉar mi lernis kelkajn aferojn pri nuklea energio kiujn mi ne konis. Vespere, estis la solena fermo, la tombolao, kaj Internacia Vespere, ĉiuj en la kulturdomo. En la internacia vespero, ni ĉiuj povis partopreni: estis akceptitaj kantoj, langrompiloj, dancoj, humuraĵoj, ktp. Mi tre ĝojis tiun vesperon.

### Dimanĉo 4-a

Tiu tago, estis nur por foriri hejmen. Mi vojaĝis kune kun aliaj esperantistoj al Vieno kaj al Hispanio.

William Guerrero





# KOTIZOJ POR UEA

**MB MA SA KTO SZ PT MB-50% MB-75%**  
27 57 35 18 114 44 14 7

<https://uea.org/alighoj/kotiztabelo>

## KOTIZOJ POR MONATO

rete: 35,40 EUROJ

Ni aldonas superrigardon de la tarifoj por la nova jarkolekto.

MONATO surface: 59 EUROJ

MONATO aere: + 3 EUROJ

MONATO Jaro : 6,9 EUROJ

La Jaro aere : + 3 EUROJ

La kotizoj por UEA ne sanĝiĝis, la kotizoj por Monato sanĝiĝis iomete. Do atentu.

Bonvolu ne prokrasti la pagon. Pli bone pagi en decembro aŭ januaro. Ankaŭ vi povas pagi la aliĝon al la UK en Kanado.

Krom tio, feliĉan novan jaron.

Mi supozas ke vi havas mian konton, sed jen denove,

**TITULAR: PEDRO A. GARROTE ESCRIBANO**  
**BANKO: BANCO SANTANDER EN VALLADOLID**

Antaŭe estas Banko Banesto

**IBAN en formato electrónico : ES5600306002740000901271**

**IBAN en formato papel :IBAN ES56 0030 6002 7400 0090 1271**

Saluton al ĉiuj,

**PEDRO GARROTE**  
**PERANTO EN HISPANIO**

# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## Andaluzio

(Sevilo) Ĉi jare, la Andaluzia Zamenhoffesto okazis en la urbo Sevilo, organizita de la grupo en privata komforta lokalo, kie ne mankis bongusta manĝo kaj regis bonega etoso, ĉar la grupo kutimas organizi tiajn allogajn kunsidojn kie valoras la penon partopreni. Ni jam spertas pri ĉi agrabla kunsido kun sevilanoj, ĉar ili estas tre forta grupo kaj de tempo al tempo ni kunsidas, ĉefe okaze de esperantaj eventoj. Ni profitis la okazon praktiki la lingvon po unu el la ĉeestintoj, kiuj salutis kaj opiniis pri la Movado en nia regiono kaj pri diversaj projektoj.

La kunsido estis fruktodona, ĉar ni parolis pri gravaj aferoj, inter ili pri la Semajno Internacia de la Kulturo kaj Turismo, kiun venontjare ni planas okazigi en Malago aŭ ties provinco, ĉio dependos de la plej taŭga hotelo kaj de la skipo, ĉar organizi ĉi tian eventon estas komplike. La grupo de Sevilo pretas kunlabori por ke la projekto sukcesu. Iamaniere ĝi devas okazi ĉe apudmara urbo, ĉar la Internacia Semajno ĉiam okazis en Katalunio ĉe la maro kun la ideo profiti la bonan veteron, ĉar la evento ne temas pri tipa kongreso, sed pri renkontiĝo kun la ideo turismi, ekskursi al kelkaj belaj urbetoj, ĝui tipan andaluzan folkloron, partopreni per mallongaj prelegoj, spritaĵoj kaj gustumado de malaga vino kaj tipaj aperitivoj. Ni esperas ke la eblaj ĉeestontoj ŝatos la ideon, ĉar la plimulto estas francoj kaj la vojaĝo al Andaluzio plilongiĝos, ĉar multaj kutimas veturi per aŭtomobilo. Ĉi foje ni planas okazigi la Andaluzian Kongreson de Esperanto por tiuj, kiuj volonte dezirus ĉeesti, ĉar ne estas devige, do ni havas gravan taskon antaŭ ni, sed ankoraŭ mankas kelkaj monatoj ĝis la fino de septembro kaj komenco de oktobro. Entute unu semajno.

Por fini la kunsidon, ni kantis kristnaskajn kantojn kaj tostis je la venonta renkontiĝo. Brakumoj kaj kisetoj ne mankis en esperanta kaj harmonia etoso.

Ángel Arquillos



## Alakanto

(Benidorm)



Kelkaj homoj kiuj loĝas en Benidorm kunvenis por la festo de Zamenhof. De maldekstra dekstren niaj nomoj estas: Francisco Javier, Concepción, Carmen kaj Juanjo.



Alikantanoj kaj murcianoj festis kune la Zamenhofan Tagon en Murcio ĉi jare (la venontan jaron ĝi okazos en Alikanto) sed la anoj el Guardamaro ne povis iri tien.

Kelkaj esperantistoj el nia urbo festis la tagon en la Redona del Esperanto apud la Placeta de Codorniu, la Apostolo de la Arbo kaj pioniro de Esperanto en Hispanio. Tie ni faris fotojn kaj parolis pri Esperanto al homoj, kiuj demandis nin.

Poste, ni iris al la Esperanto Ekoliteratura Bosketo, kie ni plantis du novajn figarbojn, purigis la lokon kaj akvumis la arbojn.

Finfine, ni kune tagmanĝis en restoracio.

LOLA

## Aragono

En Zaragozo, eme al celebros de Zamenhof-Tago, Libro-Tago kaj laŭdire E-Tago, okazis diversaj eroj rakontindaj.

La sabaton 14an, en centra restoracio, membroj de *Frateco* kaj simpatiantoj renkontiĝis en frateca tagmanĝo. Ĉe la desertoj, agrabla surprizo: alvenis Alberto Granados, el tuelo asocio: LiberAnimo kaj Frateco kuniĝis en amikeca Egaleco.



La mardon 17an ni kunvenis en nia sidejo. Profitante la okazon ke "antaŭ 500 jaroj"

komenciĝis unu el la plej emociaj aventuroj de la homa historio (ekspedicio de Magelano kaj Elkano, 1519-1522), Lorenzo

Noguero prelegis pri tioma ĝiro al mondo en 30 minutoj. Kurioze, la nombro de ĉeestintoj proksimume estis sama al tiuj 18 survivantoj de la naŭo "Victoria" kiuj sukcesis reveni hejmen. Libro-Tago-eme, indas substreki triobla agrabla surprizo: ekzistas E-libro pri tiu aventuro, ĝi estas libere atingebla per interreto kaj ties legado estas flua kaj alloga navigado: František Omelka estis la esperantisto aŭtoro de *La Granda Admiralo*.

*Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo*. Menciindas ke la verko aperis en interreto ("project Gutenberg") precipe pro la perado de Miroslav Malovec. Koran kaj beletran dankon!

"Navigi (esperanteme) estas necese"... Foje, transen ("plus ultra")...

Lorenzo Noguero



## Bilbao

La sabaton 14an de decembro, ĉirkaŭ 20 homoj sekvis la alvokon de la E-Grupo de Bilbao por kunmemori la naskiĝtagon de la iniciatoro de Esperanto.

Ni komencis per spektado de 10 minuta tranĉaĵo de la fama vidbendo "Esperanto", de Roman Dobrzyński, kiu inkludis la finan kanton de "La espero".

Al tio sekvis spektado de alia filmo pri Esperanto en nia regiono, kies aŭtoro estas la filo de Natxo Apaolaza; ege interesa filmo kiu enkondukis la ĉeestantojn al vigla debato.

Kaj, kiel tradicie, ni finis la kunvenon per komuna manĝado de la frandaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj, kio okazigis la renkonton de malnovaj konatuloj.

Antaŭ la "oficiala" kunveno en nia sidejo, oni ankaŭ okazigis kunsidon de la "eŭskaj esperantistoj" ĉe vegetarana restoracio de Bilbao. Ili vizitis poste la straton Esperanto kaj por finiĝi la tagon, la plejparto ĉeestis la kunvenon en la Grupejo, kie finfine ni ĉiuj kunvenis.

Certe estis neforgesebla tago.

Foto 1: Partoprenintoj en la kunveno de eŭskaj esperantistoj.

Foto 2: Parto de la kunvenintoj en la E-Grupo de Bilbao.

Foto 3: Parto de la frandaĵoj, kiujn ni gustumis.





(Teruelo)

La 16an de decembro, la membroj de LIBERANIMO aranĝis la ĉi jaran kunvenon. Ni aprobis la informon pri la agadoj faritaj dum la jaro 2019 kaj pri novaj projektoj por la venonta jaro. La membroj de la estraro estis reelektitaj kune kun novaj voĉdonantoj.

Poste ni gaje vespermanĝadis.

Ni havas novajn membrojn kaj, entuziasme, novajn ideojn por disvastigi Esperanton en Teruel'!



## Kanariaj Insuloj

La 15-an de Decembro, Esperanto Gran Canaria organizis neformalan renkontiĝon en la insula ĉefurbo por festi la Zamenhofan Tagon. Ĉeestis kaj novaj kaj malnovaj amikoj, kiuj vigle konversaciis en aŭ pri la internacia lingvo kaj pri diversaj iniciatoj. Speciale ĝojiga estas la novaĵo, ke ekde la 9-a de Januaro ni denove oferos ĉiujajudajn senpagajn lecionojn en la ŝtata publika biblioteko de Las Palmas de Gran Canaria. Do, ni havis duoblan motivon por festi!



## Madrido

### ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO



Por celebri la 160-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, la sabaton 14an de decembro kunvenis la esperantistoj de Madrido kaj ĉirkaŭaĵoj. La evento, organizita de Madrida Esperanto-Liceo, okazis, same kiel pasintjare, en kulturejo *Centro Sociocultural Mariano Muñoz*, en la kvartalo Pradolongo-Usera.

MEL disponis la lokon ekde la 11a matene ĝis la 6a vespere. La programo estis sufiĉe varia. Pedro Hernández prelegis pri antikvaj lingvoj, Ana Manero pri la biblioteko de HEF, Félix Jiménez

Lobo pri la kurso de UNED. Toño del Barrio proponis lingvan ludon pri kreado de vortoj; Juan del Castillo gvidis ludojn per iloj kaj kartoj. Pluraj el la ĉeestantoj manĝis kune en la kafejo de la centro.

Libroservo funkciis dum la tago. Ĉeestis ĉirkaŭ dudeko da homoj, kelkaj venintaj el najbaraj regionoj.

## Badaho

Kiel dua fojo en la historio de Esperanto en Ekstremaduro, la tiea grupo nome BONEGE kunsidis en Don Benito okaze de la Zamenhofa Tago. Krom la en multaj lokoj tradicia kunmanĝado, la kunveno utilis por babiladi, fari planojn (por pliaj dumjaraj kunsidoj kaj ne nur unu) kaj interŝanĝo de esperantaj libroj kaj materialo. Oni profitis la okazon ankaŭ por komenti la partoprenon de la taganoj en kongresoj en la du lastaj jaroj, ĉar ĉiuj partoprenis almenaŭ en unu kaj ĝis en kvar; tiukadre ankaŭ oni cerbumis pri eblaj partoprenoj en venontaj kongresoj. Post kafumado ankoraŭ restis tempo por agrabla traparka promenado antaŭ adiaŭo kaj disiĝo.



## Kantabrio



Ĉi-jare la Kantabra Esperanto-Asocio (KantEA) celebris la “Zamenhof-Tagon”, tagon en kiu oni omaĝis la iniciatinton de Esperanto, d-ro Zamenhof, okaze de lia 160a datreveno, en la ĉefurbo de Kantabrio, Santander, la 14an de decembro, per komuna tagmanĝo, kiun ĉeestis 20 homoj, en tre konata restoracio en El Sardinero.

La celebrado de la “Tago de la Esperanta Libro”, kromnomo de la Zamenhof-Tago, okazis en tre bona etoso, kaj, dum ĝi, oni multe parolis pri esperantaj libroj kaj, kompreneble, ankaŭ pri la preparlaboroj de la 79a Hispana Esperanto-Kongreso, okazonta de la 30a de aprilo ĝis la 4a de majo de 2020 en Comillas.

En oktobro okazis en Santander, organizita de Carlos Pesquera, la junulara renkontiĝo nomata “Benkontiĝo”-2019, en kiu, dum pluraj tagoj junuloj el diversaj landoj profitis la okazon por pároli en Esperanto, prezenti la lingvon en aranĝo organizita de konata Librejo, kaj samtempe koni la ĉefurbon de Kantabrio.





## Valencio



La 14an de decembro 2019, parto de nia societnaro kaj iuj el ties geampartneroj -16 entute- celebris la Zamenhofan tagon per bankedo, ĉe la promen-alirebla Kafejo “Carmen”. La manĝaĵo estis ege bongusta kaj la etoso estis distra kaj plenplena je optimismo kaj novaj ideoj por revivigi la grupon en 2020 malgraŭ la malfaciloj.

Antaŭe, ni eksterordinare celebris nian ordinaran Asembleon. Ja estis multaj urĝepritraktendaj temoj, interalie la renovigo de la estraro. Dum la venontaj du jaroj prezidos Raúl Salinas-Monteagudo. Rimarkinda pri la nova estraro: por la unua fojo en multaj jaroj, ĝi inkludas du sub-kvardek-jaraĝajn membrojn.

Jen historia anekdoto: Antaŭ multaj jaroj, kiam nia sidejo staris proksime de la strato Zamenhof, oni faris promenadon al la ŝildo de nia genia Majstro, portante ŝtupareton. Per ĝi, oni metis laŭran kronon sur la omaĝan ŝildon. La posta kantado de la himno certe mir-frapis la preterpasantojn. Ĉiuokaze, tio ja estis bela ritualo.

Raúl Salinas

# ESPERANTO-ATELIERO PRI “MANGA” KAJ ESPERANTAJ AGADOJ ĈE LA LERNEJO IES DE VÉLEZ-MÁLAGA

Okaze de la fino de la unua trimestro de la studtemo *Esperanto kaj Eŭropaj Valoroj* en la IES Almenara kaj koincide kun la internacia festo de la Tago de Zamenhof, disvolviĝis multnombraj kaj diversaj agadoj kiel:

- La okazigo de komiksa konkurso en Esperanto.
- La okazigo de manga-stila konkurso en Esperanto.
- La partopreno en la "Halo de Manga" kaj Alternativa Kulturo de Vélez-Málaga.

Ambaŭ afiŝoj kaj komiksaj konkursoj havis bonan ricevon kaj ĉiuj verkoj estis ekspoziciitaj sur la muroj de la centro, la 4 plej bonaj estis elektitaj por ornami la informan afiŝon, kiun la IES Almenara havis en la "Manga Halo" de la urbo, kie ili realigis tri Esperanto-atelierojn, kaj informoj kaj akcelaj agadoj konataj kiel "Jogo de lingvoj". La Esperanto-atelieroj vekis grandan intereson inter la ĉeestantoj, kiuj povis preni informajn mini-kursojn pri la lingvo, kaj la rekta rilato kun multaj familioj de studentoj ĉeestantaj al la Almenara IES ankaŭ estis speciale pozitiva kaj tiel oni povis havi la okazon lerni la lingvon persone kaj ricevi pozitivan impreson pri ĉi tiu nedeviga studtemo, kiun elektos la infanoj en la sekvaj kursoj.

La partoprenantoj de la atelieroj speciale taksis la karakterizaĵojn de la lingvo, kiuj povas faciligi la lernadon de aliaj lingvoj kaj precipe la eblecon studi ĝin ĉe UNED kaj tiel akiri krediton, kiu povas profiti ilin en ilia akademia vivo por la universitato.



A. Fabián Jiménez





## SUKCESO DE LA 2a FESTIVALO DE LINGVOJ DE LA MONDO EN CHESTE

La sabaton 26an de oktobro okazis en la urbo Ceste (ne malproksime de Valencio kaj kun fortaj historiaj rilatoj al Esperanto) la dua eldono de la Festivalo de Lingvoj de la mondo organizita de la Esperanto-grupoj de Ceste kaj Valencio. Sub la devizo "Ĉiu kun sia lingvo kaj Esperanto por ĉiuj", la festivalo disponis je la apogo de la Urbeŝtaro, kaj okazis en la centro por instruado de plenkreskuloj de la 10a ĝis la 19a horo. Dudeko da partoprenantoj prezentis siajn lingvojn dum po 45 minutoj ĉiufoje, laŭ la modelo kreita antaŭ kelkaj jaroj de la usona esperantisto nun loĝanta en la Valencia regiono, Dennis Keefe.

En la retejo <http://www.banducheste.es/2019/10/31/cheeste-acoge-el-ii-festival-de-lenguas-del-mundo/> oni povas legi ampleksan raporton, kun bonaj fotoj.





# INVITO AL COMILLAS



79<sup>a</sup> HISPANA ESPERANTO-KONGRESO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Comillas  
Cantabria  
2020


de la 30a de aprilo  
ĝis la 4a de majo

KantEA FEDERACION ESPERANTO DE ESPAÑA

La Loka Kongresa Komitato de la 79a Hispana Kongreso de Esperanto kreis simpatian videon por inviti ĉiujn al la bela urbo Comillas (Kantabrio, Vi povas ĝin spekti en la adreso: <https://www.youtube.com/watch?v=XswKZg7q6hE>.

Kiel novaĵo ni povas konfirmi la muzikajn spektaklojn de la tuluza artisto JoMo kaj la kataluna grupo Kaj Tiel Plu, kiuj dancigos eĉ la plej timemajn partoprenantojn. Oni ankaŭ konfirmas la okazigon de postkongresa promenado laŭ la marborda Jakoba Vojo, kies etapojn vi povas legi en la sekva paĝo. Vidu aliajn erojn de la programo, en la retejo de Kantea.

Post la fino de la unua aliĝperiodo ni estas jam tre proksimaj al la nombro de 100 aliĝintoj. Kiu estos la 100a!?



# PROMENADO LAŬ LA JAKOBA VOJO

## Postkongresa ekskurso

### 1.- La ideo.

Antaŭ longe, kelkaj membroj de Hispana Esperanto-Federacio interparolis pri organizo de promenado laŭ la Jakoba Vojo. Fine, ni decidis tion fari, kadre de la 79a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu disvolviĝos en Komilo (Kantabrio, norda Hispanio).

Ne temas pri konkuro sed nur pri trankvila, iom longa promenado. Ni promenos, parolos esperanton, kantos, ridos, ĝuos la pejzaĝojn...


Ankaŭ ne temas pri "religia promenado", kvankam, kompreneble, ankaŭ homoj kun forta religia spirito povas aliĝi, ne tiu estas la karaktero de la kunmarŝado en ĉi tiu okazo.

### 2.- Itinero: De Komilo (Comillas-Kantabrio) al Ĥiĥono (Gijón-Asturio)

Estas multaj vojoj al Kompostelo. Ni elektis la "nordan Jakobon Vojon" ĉar ĝi ebligas al ni ekiri el Komilio. Jen hispanlingva retejo kun mapo, kiu prezentas klaran bildon pri la sekvinda vojo:

<https://www.gronze.com/camino-norte>

En ĉi tiu bildo, vi povas trovi la vilaĝon Komilo (Comillas) kaj la urbon Ĥiĥono (Gijón). Niaj etapoj kuras ene de du hispanaj provincoj: Kantabrio kaj Asturio. Malgraŭ ke la vojo neniam kuras tro for de la marbordo, ĝi ne estas ebena, sed havas deklivojn. Do, vi devas nepre konsideri:



A).- La promenado estos longa: ĉirkaŭ 150 kilometrojn entute

B).- Iom da trejnado estas bezonata. Ni rekomenas promeni multe dum kelkaj tagoj antaŭ la promenado, kaj, kiam eble, supreniri ŝtuparojn. Ne necesas esti sportisto, sed esti, almenaŭ, en bona korpostato.

### **3.- Datoj kaj etapoj**

La promenado komenciĝos marde, la 5an de majo, je la 9a matene, apud la kongresejo.

Jen la etapoj:

- 1.-Mardo 05/05/2020: De Comillas ĝis San Vicente de la Barquera (12 km)
- 2.-Merkredo 06/05/2020: De San Vicente de la Barquera ĝis El Peral (19 km)
- 3.-Ĵaŭdo 07/05/2020: De El Peral ĝis Llanes (22 km)
- 4.-Vendredo 08/05/2020: De Llanes ĝis Collera, apud Ribadesella. (29 km)
- 5.-Sabato 09/05/2020: De Collera ĝis La Isla (19 km)
- 6.-Dimanĉo 10/05/2020: De La Isla ĝis Villaviciosa (22 km)
- 7.-Lundo 11/05/2020: De Villaviciosa ĝis Ĥiĥono (29 km)

### **4.- Loĝado**

La loĝado okazos en malmultekostaj hoteloj. Ne temas pri gastejoj, sed pri hoteloj.

La ĉambroj estos ĉiam du-litaj aŭ tri-litaj, kaj ĉiu havos propran banejon.

### **5.- Transporto de dorsosakoj**

Ni ne devos mem porti niajn dorsosakojn. Ni kontraktos ilian transporton kun la nacia Poŝto (“correos”).

Ĉiutage, post la matenmanĝo, ni lasos niajn dorsosakojn en la hotelo. La Poŝto kunportos ilin ĝis la sekvonta hotelo, kie, alveninte, ni trovos ilin.

Grava afero! La Poŝto nur transportas po UNU objekton. Do, ĉiuj aĵoj (ombreloj, ĉapeloj, botoj, ktp) devas esti aŭ ene de nia dorsosako aŭ tre bone ligitaj al ĝi.

Ni rekomenas kunporti dum ĉiu etapo malgrandan dorsosakon kun akvo, iom da mangaĵoj, vestaĵoj por pluvo...

### **6.- Nutrado**

En kvin el la sep antaŭmenditaj hoteloj la prezo por loĝado inkludas la matenmanĝon. En la du aliaj etapoj ni serĉos trinkejon, aŭ similaĵon, por matenmanĝi.

(Kompreneble, estas rekomendinde forte matenmanĝi antaŭ la komenco de ĉiu etapo)

La prezo inkludas nek tagmanĝojn nek vespermanĝojn. Iel ajn, kaj en Kantabrio kaj en Asturio oni povas tre, tre bone kaj abunde manĝi kontraŭ malaltaj prezoj.

### **7.- Kiel alveni en Komilon kaj kiel foriri el Ĥiĥono**

Pri la maniero veni en Komilon, oni konsultu la oficialan paĝon de la 79a Hispana Esperanto Kongreso

<http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/utilaj-informoj>

Post la promenado, povas esti bona ideo tranokti en Ĥiĥono (la lasta etapo estas longa kaj iom laciga). Ĥiĥono estas granda urbo (ĉirkaŭ 300.000 loĝantoj) kaj tie facilos trovi loĝejon.

Por foriri el Ĥihono estas diversaj rimedoj:

- Aviadile, estas flughaveno en Avilés (30 km for de Ĥihono)
- Aŭtobuse: eblas reveni al Komilo, aŭ al Santander...
- Trajne: Estas trajnoj al Madrido. Ankaŭ ekzistas fervojeto por reveni al Santandero, kiu ekiras el Oviedo (apud Ĥihono). La trajnvojaĝo mirindas, sed ĝi longe daŭras. Ĝi estas speciale rekomendinda por amantoj de fervojoj.

## 8.- Prezo

Pli-malpli, po 200 eŭrojn.

La prezo inkludas la loĝejojn (kaj, kiel dirite, kvin matenmanĝojn), kaj la transporton de la dorsosakoj.

Ĉiu promenonto devas kalkuli pri manĝado, bierumado...

## 9.- Aliĝo

Aliĝu rapide. Ni akceptos nur 20 promenontojn!

Por aliĝi, sendu retmesaĝon al la retpoŝta adreso: kongreso@esperanto.es

Por konfirmi la rezervadon NEPRE sendu 25 eŭrojn (dekalkulendaj de la fina prezo). Tiun pagon faru per:

Banka transpago al: Asociación Cántabra de Esperanto

Banko: Caja Rural de Burgos, calle Floranes 23, 39010, Santander

IBAN: ES06 3060 0071 8421 3512 2212 / BIC: BCOEESMM060

Aŭ per la UEA-konto de Asociación Cántabra de Esperanto: kodo (asce-h)

Aŭ per... Paypal (79ahispanaesperantokongreso@gmail.com) (NEPRE usante la opcion “pago al amiko aŭ familiano”)

Ne forgesu NEPRE mencii ĉe la pago vian nomon kaj la indikon “Jakoba Vojo”

Gravaj informoj:

- Ni rezervas lokon nur post la pago de la 25 eŭrojn
- Se okazas malaliĝo, la organizantoj ne redonos la garantiaĵon.

Kantea Grupo





## ROMPU! ROMPU! TEATRAĴO EN ESPERANTO



Blanca Gracia, verkistino kaj reĝisorino de teatro, kreis projekton sub la esperanta titolo *Rompu! Rompu! la murojn inter la popoloj!* por prezentado ĉe la *Centro de Residencias Artísticas del Matadero de Madrid*, grava kultura centro en Madrido.

La verko konsistas el tri partoj, el kiuj la unua kaj la dua estas preskaŭ senvortaj kaj rakontas historiojn per dancado. La unua parto temas pri la mito de Eĥo kaj Narciso. La dua, pri Kalibano, rolulo el *La Tempesto* de Shakespeare. Sed la tria parto, ankaŭ ĉefe danca, havas sufiĉe longan tekston... en Esperanto.

Oni montras paradon kaj specon de mitingo de iu bunta kaj iom surrealistma “Esperantista Brigado”, kies prezidantino verve alparolas al la partoprenantoj, komencante per la vortoj:

*Karaj samideanoj, ni apartenas al unu sola nacio: La Mondo! Ni ĵuras lojalon al la Homaro, nia lando estas la Mondo kaj niaj sampatrujanoj la homa specco!*


Kaj la aŭtorino-reĝisorino kaj la aktorino estas neesperantistoj, kaj ili kontaktis HEF petante helpojn por la tradukado de la teksto kaj por la gvidado de la aktorino. Miguel Fernández faris belan tradukon, kaj aliaj membroj de HEF instruis kaj gvidis la aktorinojn.

La premiero okazis la 29an de novembro en la salono Max Aub de la kulturcentro Matadero, en Madrido. La hispana versio de la esperanta teksto aperis surekrane por la ne-esperantista spektantaro. La aktorino tre bone sukcesis en la por ŝi malfacila tasko ludi la rolon en bone prononcita Esperanto, kaj la tutan projekton ni taksas tre pozitive.

A.P.



## BELARTAJ KONKURSOJ



Suso Moinhos, aŭtoro de la poemaro “Laminarioj” ricevis la unuan premion – premion Luigi Minnaja – pro la eseo: “Kodado en ‘La kato en la sako’ de Mason Stuttard”, kaj la duan premion pro la eseo “Stereotipaj komparoj en Esperanto”, en la 70a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA.

## POEZIA ANGULO

La suno

Ruĝiĝas la suno,  
Ĉu pro kolero?  
Ĉu pro ĵaluzo, ĉar la luno  
Amindumas kun stelo?  
Mi ne scias...  
Ĉar mi kaŝe lin observas,  
Kaj mi penas  
Ne kompreni lian senton

Arquillos oktobro 2019

# LIBERECANA ATENO DE GRÀCIA

La Esperanto-grupo ĉe Liberecana Ateneo de Gràcia, kreita post la pasinta SAT-kongreso, ŝatus havi korespondadon kun homoj/grupoj sendepende de nacio, aĝo ktp. Ni promesas respondi.



Tiu ateneo estas mem-mastrumata kultura centro enradikigita en konata kvartalo de Barcelono. Ĉiutage oni organizas prelegojn, kursojn, libro-prezentojn, ekspoziciojn, koncertojn, poeziajn vesperojn... ĉio senpage por la publiko danke al la diversaj kontribuoj de ĉiu voluntulo kaj al la mona subteno de ĝiaj membroj. Ĝi enhavas bibliotekon, trinkejon kaj veganan manĝejon. El maldogme-ma perspektivo oni celas

transformi la realon per kulturo kaj lernado. En tiu kadro Esperanto enŝoviĝas nature. Krome, la kvartalo havas okdekjaran historion kun la internacia lingvo. Tio estas, la nunaj liberecanoj sentas sin heredantoj de tiuj idealistoj kiuj en la 1920aj kaj 1930aj jaroj klopodis konstrui utopion. Pluraj el ili partoprenis unuafoje en Esperanto-evento pasintaŭguste, okaze de la 92a SAT-kongreso en Barcelono. Kaj decidis starigi la grupon. Nuntempe ĝi konsistas el deko da entuziasmaj komencantoj, kiuj lernas rapide ne nur la lingvon, sed ankaŭ pri ĝiaj kulturo kaj historio. Tiumaniere oni eble kreas aktivajn movadanojn kaj ne nur Esperanto-parolantojn/legantojn. Ili havas grandan scivolon pri aliaj mondopartoj kaj interalie ŝatus pretigi ekspozicion de internaciaj poŝtkartoj, kiel niaj antaŭuloj kutimis fari antaŭ la alveno de Interreto.

Bonvolu skribi al: [saioaescobar@hotmail.com](mailto:saioaescobar@hotmail.com)

Aŭ se vi preferas papere:

Liberecana Ateneo de Gràcia  
Esperanto-grupo  
Carrer de l'Alzina, 5  
08024 Barcelono

# LA ANDALUZIA ROKMUZIKO (Ĉ.1970-1985)

(Daŭrigo)

(Mallonga kaj baza aliro al tiu ĉi temo)

## C) ALIAJ GRAVAJ ENSEMBLOJ

Sed ne estis Triana la nura muzika ensemble kiu naskiĝis en tiu epoko kaj kiu verkis tiun muzikan stilon. Multaj aliaj muzikistoj komencis siajn proprajn muzikajn vojojn. Menciendas la jenajn, laŭ la jaroj de ilia naskiĝo:


- **Imán** (1976): ili publikigis 2 imponajn kaj kompleksajn albumojn, preskaŭ tute nurinstrumentaj: “Imán, Califato Independiente” (“Imamo, Sendependa Kalifejo”) kaj “Camino del Águila” (“Vojo de la Aglo”). Sufiĉis por pruvi ke temis pri neegaleblaj muzikistoj kaj komponistoj. Imán disiĝis post la somero de 1980, kvankam poste ili denove kuniĝis por surscenaj ludadoj.




- **Cai** (1977): tiu ĉi ensemble devenas el Kadizo (jen la origino de sia nomo). Inter iliaj muzikistoj tre famas **Chano Domínguez**, pianisto kiu poste sekvis sian propran unuopan muzikan kurson, kunlaborante kun multaj aliaj muzikistoj. Cai publikigis 3 albumojn, el kie elstaras la unua, nome “**Más Allá de Nuestras Mentres Diminutas**” (“Pli Fore de Nia Eteĝaj Mensoj”); pri tiu disko, kvankam ĝi estas iom mallonga (ĝi daŭras nur 33 minutojn) direndas ke temas pri vera majstra verko ene de la tutmonda progresiva rokmuziko.

- **Guadalquivir** (1977). Temas pri kvinopo kiu surbendigis tri diskojn, inter 1978 kaj 1983. Ilia muziko estas tute instrumenta kaj tre ĵaza-stila. Inter iliaj muzikistoj menciendas **Luis Cobo “Manglis”**, elstara gitarludisto.





- **Alameda** (1978): ili publikigis kvar albumojn, inter 1979 kaj 1983. Ilia muziko baziĝas sur pianoj kaj klavaroj, kaj ĝi sonas pli “dolĉa” kaj “klasika” ol tiu de Triana. Menciendas la du fratoj pianistoj **Marinelli**, la basgitaristo **Manuel Rosa** kaj la gitarludisto kaj elstara kantisto **José Roca**.



- **Medina Azahara** (1980). Tiu ĉi ensemblo devenas el Kordovo. Temas pri kvinopo kiu havas la plej longdaŭran muzikan kurson de la tuta andaluza roko, pro tiu ke ili ankoraŭ ekzistas kaj ke, kvankam multaj ŝanĝoj okazis ene de la membraro, ili neniam disiĝis. La stilo de Medina Azahara estas pli “metala” aŭ “peza” ol tiu de la aliaj ensembloj menciitaj antaŭe. Dum la unuaj jaroj de ilia kurso ili multe vendis, precipe ilian unuan albumon “Paseando por la Mezquita” (“Promenante tra la Moskeo”) publikigita en 1980, disko kiu estas aprezata kiel alia majstra verko de la hispana muziko.

## D) ALIAJ MENCINDAJ NOMOJ

Oni povus ankoraŭ nomi kelkajn aliajn ensemblojn kaj artistojn kiuj sekvis tiun andaluzian rokmuzikon. Ne ĉiuj el ili estis andaluziaj muzikistoj, sed iamaniere ili faris tian muzikon. Menciendas la jenajn ensemblojn: **Veneno** (1975-1978), **Vega** (1977-1982), **Granada** (1974-1979), **Mezquita** (1978-1981) kaj **Pata Negra** (1978-1990).

Aldone, oni devas nomi aliajn unuopajn artistojn:

- **Kiko Veneno** kaj **Raimundo Amador** kiuj, krom iliaj unuopaj kursoj, ankaŭ estis membroj de la ensemblo “Veneno” ĵus menciita supre kaj kiu nur surbendigis unu gravegan diskon en 1977. Raimundo Amador, siavice kaj dum multaj jaroj, majstre ludis kaj registris elstarajn miksaĵojn de flamenko kaj bluso.



- Miguel Ríos, famega hispana kantisto kiu en 1977 publikigis tiustilan diskon, nomita “Al-Andalus”;

- Camarón de la Isla, kiu, ene de sia neegalebla tutspeca flamenka vojo ankaŭ registris, en 1979, gravan diskon kiu, iamaniere, havis influon de la andaluzia rokmuziko: “La Leyenda del Tiempo”(“La Legendo de l' Tempo”).

## E) FINO KAJ HEREDAĴO

Ekde ĉirkaŭ 1984-1985 la andaluzia rokmuziko komencis sian dekadencan, kaj iom post iom ĝi malaperis. Tamen, ĝia influo ankoraŭ daŭras en la verkoj de multaj artistoj. Aldone, kelkaj antikvaj ensembloj rekuniĝas de tempo al tempo por ludi surscene kelkajn spektaklojn. Kaj multaj el la tiutempaj diskoj estas prezataj kiel “klasikaĵoj” ĝuindaj por ĉiame.

Juan García del Río

# KLIMATŜANĜO. ALISPECA PLUVO

*Miguel Fernández*

En la tuta mondo, la t.n. Klimat-Semajno (23a – 29a de Septembro 2019) mobilizis homamasojn kontraŭ la mistraktoj farataj al la Tero, kiuj endanĝerigas ĝian pluekziston. En 150 landoj, okazis diversspecaj protestoj. En Hispanio, gravis i.a. la respondo al la kunvoko pri tutmonda striko por la klimato, la 28an de Septembro, kaj, samtage, amase partoprenitaj manifestacioj en diversaj urboj. En Madrido, unu tagon poste, ni poetoj estis kunvokitaj al la aranĝo Poetas por el clima [Poetoj por la klimato], en la studioj de Radio Utopía [Radio Utopio], en ĉeesto de publiko. Miaflanke, mi verkis por la okazo jenan poemon, kiun mi deklamis dulingve (en ĝia originala esperanta formo kaj en mia hispanigo), kadre de tiu aranĝo:

Doloru al ni la vivo  
Ĝis ni kredos  
Ke devas pluvi,  
Diluve <sup>2</sup>

**Pablo Guerrero**

**POETAS  
POR EL CLIMA**

recital colaborativo en defensa del planeta

Sábado 28 de septiembre de 2019  
12 horas

**ESPACIO UTOPIÁ**

107.3 FM radioutopia.es

**ORGANIZAN:** EDUARDO ANDRADAS  
ARMANDO SILLES



**Con  
actuación  
musical:  
DAMDARA**

**"NO HAY  
PLAN-ETA B"**

Entrada libre

**RADIO UTOPIÁ**

Avda. Somosierra, 12, 1ºD,  
San Sebastián de los Reyes

COLABORAN:  
   
OLVIDA TU EQUIPAJE

Al Aurora Maíz, filino de  
la poeto Jordi Maíz, por ke ŝi  
Semu semojn de puraj matenuĝoj



Hezito de aŭroro: jen ŝajna matenruĝo.  
Kaj tagiĝas.  
Kantas la Tero per turniĝo ĉirpa  
ĉirkaŭ plej olda akso neŝmirita.  
Montoj kantemas. Vane. Kantas fine riveroj  
la raŭkan raslon de sia fluo cianura.  
Elsiblas kamenaro vaporojn morto-semajn,  
kiuj forcados varmojn kaj incitos  
plej la murdeman kankron.

Kaj mi fermas la libron, la okulojn.  
Mi aŭskultas la mantron de pluvo sur la vitroj.  
Sed tia pluv' alias:  
similas al *Pluvguto*, de Ŝopeno.  
Samkiel Isabel,  
nun mi vidas la pluvon en Macondo.

---

<sup>1</sup> La pria podkasto aŭskulteblas ĉe: [https://www.ivoox.com/poetas-clima-audios-mp3\\_rf\\_42212223\\_1.html](https://www.ivoox.com/poetas-clima-audios-mp3_rf_42212223_1.html)

<sup>2</sup> Versoj el la teksto de la kanto *A cántaros* [Diluve], verkita de la ekstremadura kantpoeto Pablo Guerrero en 1972, nome tri jarojn antaŭ la morto de la diktatoro Franco. Ĝi furoris en interpretado far la propra aŭtoro tial, ke la diluvo, kiun li petis kaj profetis, kaj multaj esperplene atendis, estis la diluvo de demokratio, kapabla inundi la diktaturajn strukturojn de la naci-katolikisma Hispanio.



similas al *Pluvguto*, de Ŝopeno.  
Samkiel Isabel,  
nun mi vidas la pluvon en Macondo.  
Sed tia pluvo aŭ diluv' alias.

En Orienta Hispanio, stratoj,  
jamaj torentoj renversantaj pontojn  
kaj fortrenantaj kriojn  
kaj muĝojn, trunkojn, aŭtojn kaj morgaŭojn...  
kanaligas l' indignon de la oldega Tero  
kontraŭ kiuj ĝin vundas.  
Ĉar la Tero, ja blinda, ne distingas  
inter kiuj ĝin amas kaj kiuj ĝin posedas.  
Multaj ĉiomon perdas, kaj ĉi novaĵon donas  
al mondo-mastroj – vampiroj, torturistoj  
de ĉi planed' –, iliaj pluraj *Times*,  
legio da lakeoj,  
per *New Roman*-literoj  
sur pleto el arĝento kun dikaj diamantoj.

Nepras, ho, Tero!, alispeca pluvo,  
kiu la mondo-mastrojn senterigu  
kaj rompu ties bridojn kaj kuracu la vundojn  
kaj semu semojn de puraj matenruĝoj.  
Nu, jes, Pablo Guerrero, nepre pluvu.  
Ankoraŭ nune pluvu.  
Kaj ege.  
Plej diluve!

---

<sup>3</sup> Aludo al la rakonto *Isabel viendo llover en Macondo* [Isabel vidas pluvi en Macondo], de la kolombia Nobel-premiita verkisto Gabriel García Márquez (1927 – 2014).

---

